

# Nia diligenta kolegaro...

La jardeka periodo 1980-1990 karakteriĝis, por nia Esperantista Asocio, pro la reguleco de la E-laborado de ĉi ties membraro. Kompreneble, samkiel en ĉiuj aliaj E-grupoj en la mondo, la membraro-nombro neniam estis granda proporcie al la loĝantar-grando, kaj ne ĉiuj membroj estis aktivuloj. Sed tamen, en tiu periodo, kaj male al tio okazanta nuntempe, en la porEsperanta aktivado de la grupo kunlaboris deca nombro da gesamideanoj.




La strato **Esperanto**, inaŭgurita dum la 39a Hispana E-Kongreso, fariĝis renkontiĝloko de la geesperantistoj en la Zamenhof-festoj.

Dum la sep jaroj de 1980 al la Jubilea jaro de Esperanto, 1987, ne malpli ol 40 numeroj de la revuo **HELECO** estis eldonitaj. Tiam, kaj en la sekvintaj jaroj, sub la gvido kaj demarŝado de Ildefonso Domínguez, tiu gazeto aperis tre regule kaj akurate. Ĝia paĝaro ne estis granda, 8 aŭ 10 paĝoj en ĉiu numero, sed krom ĝia reguleco estas menciinda ankaŭ la fakto ke ĝia enhavo estis la rezulto de kunlaborado de kelkaj gesamideanoj, kio ne okazas hodiaŭ. Plejparto el la kunlaborantoj estis de nia E-rondo, sed estis ankaŭ foraj. Preskaŭ en ĉiu numero estis artikolo de Luis Serrano kiu, kvankam loĝanta en Sabadell de antaŭ multaj jaroj, li ĉiam sin sentas ligita al nia E-grupo, en kiu li iam aktivadis. Alia kutima kaj konstanta kunlaboranto en la gazeto estis Adonis G. Meana, Vicprezidanto de **AEA**, kaj sufiĉe ofte ankaŭ lia frato Alcibiades sendadis ion por publikigo.

Kaj estis aliaj signoj de kolektiva aktivado de la E-rondo. En majo de 1981 la grupo organizis publikan ekspozicion de fotografaĵoj pri Bulgario, okaze de la Jarmila Jubileo de tiu lando. La urba presaro informis pri tiu ekspozicio, kiu estis vizitata de multaj personoj. Aliflanke, ni jam menciis ke en tiu lerno-kurso, 1980-1981, nia E-asocio havis du samtempajn kursojn de Esperanto, unu Baza kaj alia Progresiga. Kaj ke en la sekvinta jaro, 1982, okaze de la Tutmondaj Futbal-konkuroj en nia lando, **Astura Esperanta Asocio** havis en la urba Foirejo stando por informi pri la Internacia Lingvo al la vizitantoj.

La 22a numero de **HELECO** informas ke la Katedro Jovellanos asignis subvencion de 25.000 pesetoj al nia E-Asocio kiel helpo por nia biblioteko. Tiu sama numero de la revuo informas pri tio ke Oscar Trabanko, lernanto de E-kurso de nia Asocio, sendis al la tiama brita Registrar-Prezidentino, S-ino Teacher, du leterojn, unu en la hispana lingvo kaj alia en Esperanto, pledante favore al la uzado de Esperanto kiel komuna internacia lingvo. La revuo publikigas la tekston de tiuj du leteroj kaj la respondoj, en la angla lingvo, de la brita regantaro, kiu asertis ke la propono ne estas taksata kiel praktika kaj ke por la internacia komunikado bone rolas la angla.

En julio de 1982 okazis en Malago la **42a Hispana Kongreso de Esperanto**. Estis en ĝi deca partopreno de nia grupo: sep membroj de la Gijona E-rondo kun ties respektivaj familioj. Krom partopreno estis ankaŭ ia interveno. Unu akto de tiu Kongreso estis Simpozio pri Fakaj E-organizaĵoj en nia lando. Inter la diversaj organizaĵoj partoprenintaj tiun Simpozion, **ILEI**, **HEJS**, **HEFA**, **HEKA**, estis ankaŭ la hispana Sekcio de **MEM** (**Mondpaca Esperantista Movado**) kies unua kaj fondiga asembleo estis okazinta en la kongreso en Gijón en 1979. Nu ĉi-okaze la Simpozio utilis al tiu E-fako kiel publika prezentado antaŭ la hispana esperantistaro. La prezentadon faris la Sekretario de tiu hispana MEM-Sekcio, Faustino Castaño, de